

LANDA ESPERANTLINGVA DEKLAMKONKURSO SUB LA AŬSPICIO DE HEA EN PÁPA

La konkurson organizas la Esperanto-Grupo de Pápa, la 20an de januaro 1990. La konkurso okazos en kvar kategorioj:

1. 6-10-jaruloj,
2. 10-14-jaruloj,
3. 14-18-jaruloj,
4. plenkreskuloj.

Ĉiu konkursanto preparu sin per unu poemo (aŭ fabelo, prozo). La temo estas libera. La plej bonaj konkursantoj ricevos premiojn, I-IV. lokitoj en ĉiu kategorio ankaŭ diplomon. Tri venkontoj el la 2a kaj 3a kategorioj havos eblecon partopreni en internacia deklamkonkurso en Pollando. Tion donacos ESPERTUR. Ni ne limigas la nombron de la partoprenantoj el unu loko.

La aliĝkoto estas 250 Ft. Tiu sumo inkluzivas la anonciĝon, vespermanĝon kaj tranoktadon en studenthejmo la 20an de januaro.

La loko de la konkurso: Pedagógus Múvelődési Ház, Pápa, Fő u. 2. Tel.: (89) 24-806

Alveno en Pápa la 20an de januaro ĝis la 13.30 horo. Hejmenveturado la 21an de januaro. Se iu alvenos jam vendrede, tiam tiu antaŭpago 80 Ft por la tranoktado. Akompanantoj devas pagi 300 Ft kontraŭ la samaj servoj.

Limdato de la aliĝo: la 7a de januaro 1990.

Rimarko: se vi ne petas tranoktadon kaj vespermanĝon por la 20a de januaro, tiam vi devas pagi nur 50 Ft por anonciĝo. Bonvolu samtempe kun la aliĝo pagi la aliĝkoton per ruĝa poŝtmandato al: Pedagógus Múvelődési Ház, Pápa, Pf.: 61. 8501